
# *Evoluprogramoj en la Insulo de Junularo.*



Esteban Lazo, membro de la politika buroo de la komunista partio kaj prezidanto de la insula parlamento, vizitis diversajn instituciojn ligitajn al la speciala distrikto  Insulo de Junularo, situanta sude de la kuba arkipelago, kie li dialogis kun la gvidantaro, gelaboristoj kaj civitanoj.

Dum la dialogo li alvokis ?iujn kune labori pli efike kaj kvalite por plenumi la nunan strategion sociekonomian de la insulo, celanta plibonigi kaj aktualigi la kuban ekonomian modelon.

Li vizitis la Komunumon 27 de la speciala distrikto, kiu okupi?as pri la brutaro; tie li interesi?is pri la kvalifiko de la laboristaro kaj enketis pri la potencialoj por solvi organizajn problemojn nuntempe ekzistantajn  en tiu pretermara regiono kuba, la dua plej granda de la tuta arkipelago.

En la entrepreno agroindustria de fruktoj “Jesús Montané”, la kuba parlamentestro mem spertis la laboron faritan en kelkaj bran?oj, anka? la ekfunkciigon de rizmuelejo kaj nova sekigejo por la grejno; anka? rekonis la teknologiajn progresojn por certigi la kvaliton de la semoj, kio alstrebas al pli bonaj kondi?oj, kaj la strebojn faratajn por komercado de la medicinaj plantoj.

Lazo aparte atentigis la gvidantojn esti pli viziaj, bone mastrumi kaj plani la laboron por atingi la ekonomian salton de la Insulo de la Junularo, kun la subteno de la ceteraj regionoj de la lando.

https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/nacionales/22284-evoluprogramoj-en-la-insulo-de-junularo

Radio Habana Cuba